

& Kanto pri espero:

< Rekante 19 el 37 batoj, dufoje por strofo, entute 518 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Aŭtunaj floroj, Bohema Revuo Esperanta, 1911). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

((/dodo TiLa La SooSoSo SoSo TiTi; dodo TiLa LaLa LaSo SoFa MiMi; dodo TiLa LaLa dodo dore mimi;

(#Rekantaĵe: dodo TiLa LaLa; dodo dore mimi; soso fa mi rere rere mi; dodo TiLa LaLa; LaSo SoTi La La))×2)×7)+

(&Strofoj:

'1 Ĉu vi aŭdis jam pri la evangelio, ;
kiu en la form' de juna, verda stelo ;
brilas hele al homaro sur ĉielo?

(×: &B: **Blovu for la nuboj, ; falu for la duboj, ; En la danco gaje paŝas ni, ; Blovu for la nuboj, ; falu for la duboj.**)

Ĉu vi aŭdis jam pri unu familio, ; kiu nun formiĝas gaje en homaro ; malgraŭ la landaj limoj, malgraŭ vasta maro?

(×: &B)

'2 Ho, vi certe aŭdis, sed vi sen konfido ; ekrigardas al ĉielo, kie Dio ; reaperas al ni verda en radio. Al la tero celas via laca vido ; kaj la strangajn aperaĵojn en la nuboj ; vi renkontas nune nur kun rid' kaj duboj.

'3 Kiu vin kondamnu, teraj kreitaĵoj! ; Humo estas via propra baz' kaj sfero, ; ĉiutagan panon donas al vi tero, ĝi ja estas font' de l' viv' kaj ĉiuj aĵoj, ; dume la ĉiel' vin ofte, ofte trompis, kaj evangeliojn siajn krude romp.

'4 Dio mem, la Sankta Skribo, foje venis ; sur la teron, ĉarma, nobla kun devizo, ; ke sur tero iĝu nova paradizo, sed sur Kalvario morto linekprenis, ; kaj je lia nomo, kaj pro lia amo ; plena estis poste mond' je larm' kaj flamo.

'5 Preskaŭ du mil jarojn poste sur Sekvanto ; ree Sdio ekaperis al homaro, ; nova Dio, ree granda kun fanfaro, homajn rajtojn portis li en unu mano, ; sed en dua li alportis malesperon ; kaj cent mil da tomboj kovris francan teron.

'6 Tamen sen Espero, kia estus vivo? ; Eĉ se nin forlasas niaj belaj revoj, ; eĉ se nin ekridas, kiel maraj mevoj kaj en rub' disfalas ĉiu perspektivo, ; vivo sen Espero estus sen risorto, ; senenhava vivo, animala sorto.

'7 Tial brilu al ni steloj sur ĉielo! ; Brilu, brilu, eĉ se via ĉarma brilo ; estas sen substanco, tute sen utilo kaj neatingeble dezirata celo! ; La infero estus nia viv' sur tero, ; se ĝin ne dolĉigus iam la Espero.)